

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ marraskuu ♦ novembro ♦ 5/2006



*Jukka Pietiläinen skribas enkondukon en la jubilea libro, kien ĉiuj festantoj de 100-jara Helsinka klubo skribis siajn nomojn. La jubilea skatolo enhavas interalie reklamsĝildojn. Pli pri la skatolo sur p. 3.*

## **Helsinki festis 100 jarojn, p. 12**

**Albin Sandström, p. 8 ♦ Aatu Moilanen, p. 7  
Antaŭinformoj pri la jubilea tago de EAF, p. 16**

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ ef\_redakto@surfeu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 18 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 12 e.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

**Pankkitili/Bankkonto:** Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**

tuomo.grundstrom

*Tuomo Grundström*, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ @lailanet.fi

*Taneli Huuskonen*, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

*Börje Eriksson*, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**

*Timo Pirinen*, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ (040) 592 1756 ✉ timo.pirinen@gmail.com

*Raita Pyhälä*, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

*Marjaliisa Parpala*, Utinkatu 45 B 7, 45200 Kouvola. ☎ (040) 717 4521

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet:** <http://www.esperanto.fi>



## Jubilea skatolo invitas al tutjara, tutlanda, ĉiuinspira festo

Proksimiĝas 2007. La jubilea skatolo startis sian vojaĝon tra la lando en la 100-jariĝa festo de Esperanto-Klubo de Helsinko la 10an de oktobro 2006 kaj finos ĝin en la 100-jariĝa festo de Esperanto-Asocio de Finnlando en la Nobelara domo la 28an de aprilo 2007. Dumvoje la skatolo vastigas sian enhavon per notoj, bildoj, rakontoj kaj gratuloj. Ĝi ofertas programeron en esperantorenkontiĝoj kaj kaŭzon por amaskomunikila atento pri nia agado. Kaj plej grave, ĝi prezentas al vi inviton kunfesti. La antaŭfesto jam komenciĝis.

En la skatolo troviĝas jubilea libro en kiu ĉiu grupo plenigu paĝon aŭ eble 2-4. Ĝi estas gastlibro en kiu registriĝas la moviĝo de la skatolo, la homoj kaj agadoj, kiujn ĝi renkontas. Troviĝas informoj pri eventoj dum 2007, Arta Lumo-informiloj kaj -afiŝoj – kaj etaj surprizoj! Utiligu la materialon kaj se io mankas en la skatolo vi estas bonvena kompletigi ĝin!

En Aŭtunaj Tagoj en Haukipudas la partoprenantoj estis bonvenigitaj per flirtanta flago kaj starantaj ŝildoj kun esperantosimbolo ĉe la enirejo: “Suomen Esperantoliitto kokoon-

tuu täällä tänään” (EAF kunvenas ĉi tie hodiaŭ). Poste montriĝis ke tiuj ŝildoj ludos gravan rolon en la realiĝo de la ideo pri jubile-prepara turneo al esperantogrupoj tra la lando. Du aliaj al mi konataj asocioj cirkuligis dorsosakon, sed komence de AT ni ne sciis kiel aspektu nia cirkulanta objekto.

La AT-programero pri la jubileaj preparoj komenciĝis per eniro de lumvestita prezidanto. Tiel ankaŭ la anoj de EAF povis vidi kiel prezentiĝis nia asocio kaj invito al festivalo Arta Lumo dum la Universala Kongreso (bildo pasintnumere). Post prezentiĝo de la jubileaj defioj komenciĝis grupa laboro: antaŭjubilea loka agado, antaŭtagmeza historia programo en Helsinko, Arta Lumo kaj financado.

En la grupo pri loka agado Pentti Makkonen de Jyväskylä, preparinto de la bonvenigaj ŝildoj, rakontis ke li intencis donaci ilin al EAF en granda skatolvalizo facile kunprenbla al ĉiu evento. Jen la perfekta ilo por nia turneo!

Bonvenon al nia jubilea ĉeno!

*Anna Ritamäki*

**Jubilea skatolo de Esperanto-Asocio de Finnlando**

Suomen Esperantoliiton juhlaaatikko

Jubileumsläda för Esperantoförbundet i Finland



## Viisaudet on kirjoissa

Luin äskettäin vuonna 1970 tehdyn kirjan ”Suomi vuonna 2000” (toim. Kalevi Haikara), jossa 18

kirjoittajaa eri aloilta ennustaa tulevaisuutta. Kirjassa on varsin hyvin tunnistettu monia kehityskulkuja, jotka vuoteen 2000 mennessä toteutuivat. Ehkä parhaiten toteutuneita ovat asiat, joita toteuttavat internet ja Euroopan Unioni. Tämä on ehkä yllättävää sikäli, että kumpakaan ei vuonna 1970 ollut olemassa kuin etäisinä esiasteinaan, eikä niitäkään Suomessa.

Tietenkään eivät kaikki kyseisessä kirjassa esitetyt arviot ole oikean suuntaisiakaan – kukaan kirjoittajista ei esimerkiksi osannut ennakoita sosialismin romahdusta ja Neuvostoliiton hajoamista. Mutta paljon puhuva esimerkki on seuraava sitaatti Raimo Väyräsen tekstistä:

*”Suomi-niminen poliittinen yksikkö toimii edelleenkin vuonna 2000. Tosin se on kokonut melkoisen muodonmuutoksen sikäläkin, ettei itsenäisyydestä voida puhua – paitsi tietysti juristien toimesta – samassa mielessä kuin nykyään, jolloin valtakunnan raja edelleenkin useissa tapauksissa on sangen kouriintuntuva este. Tulevaisuudessa eivät yhteiskunnalliset tapahtumat enää rajoitu valtioiden sisälle, vaan yhä enemmän tapahtuu liittymiä valtiollisten rajojen yli.”*

Nyt voi jälkiviisaasti todeta, että esimerkiksi 80-luvun puolivälissä, jolloin oli kulunut puolet kirjan tekohetken ja kohdevuoden välisestä ajasta, olisi ollut aika laajemmin pohtia yllä olevan sitaatin sisältämiä ajatuksia – mikä on kansallisvaltion itsenäisyyden rooli ja mikä on sen merkitys kansalaiselleen, millainen tulisi olla tehtävien jako kansallisvaltion ja kansainväli-

sen organisaation välillä ja millainen sen rajaus naapurivaltioihinsa nähden.

Tuollainen keskustelu jäi Suomessa käymättä, kun ensin vallitsi hiljainen tyytyväisyys 80-lukulaisen hyvinvointivaltion pysyvään idylliin ja sen jälkeen paniikki sen olemassaolon horjumisesta. Sitten meillä jouduttiinkin jo kiireessä käymään juupas-eipäs -väittely siitä, onko EU:n jäsen itsenäinen valtio.

Tietoliikenneyhteyksiä kirjassa ennustaa Kaarle Nordenstreng:

*”Väri-tv:n kuvapintana on makuuhuoneen yksi seinä, aamulehti ei tule postiluukusta vaan syntyy olohuoneessa olevassa kopiolaitteessa, taskussa on aamusta iltaan puhelinlaite, jolla voi soittaa mistä tahansa minne tahansa.” ... ”Sanomalehtien vastaanotinlaitteita on käytössä noin 100 000” ... ”80 % suomalaisista lukee päivittäin periaatteessa isoisänaikaista sanomalehteä, joka on kannettu kotiin tai ostettu korttelin lehtioskista. Taskupuhelin on hieman yleisempi; sellainen on joka kolmannen aikuisikäisen hallussa.”*

Jos katsotaan, että sanomalehden internet-versio edustaa yllä mainittua lehden vastaanotinlaitetta, niin kuvaus on aika osuva. Kännykkä toki yleistyi vähän esitettyä nopeammin, eivätkä taulutelevisiot nyt aivan seinän kokoisia edelleenkin ole.

Lähitulevaisuudessa meillä ei ole tulossa yhtä hyvää tasalukua kuin vuosi 2000, mutta tulevaisuudentutkimus tuottaa kyllä ennusteita jatkuvasti. Toivottavasti joskus jaksetaan myös vähän seurata sitä, miten ollaan menossa kohti sitä, mitä on ennustettu, eikä tehdä Juice Leskisen erään laulun mukaan, ”viisaudet on kirjoissa, ne sinne jätetään”.

Mikko Mäkitalo

## Ŝtonepoko, preĝejaj pentraĵoj kaj orgenkonzerto

La Aŭtunaj Tagoj en Haukipudas havis iom internacian etoson, ĉar la evento portis tien gastojn el Svedio kaj Latvio kaj ankaŭ el Nederlando la direktoron de la Centra Oficejo de UEA, Osmo Buller.

La municipo Haukipudas bonvenigis nin per vortoj de prezidanto de la municipa konsilio Mirja Vehkaperä. Ŝi salutis nin per kelkaj ĵus lernitaj vortoj en Esperanto kaj cetere rakontis pri trajtoj kaj evoluo de Haukipudas. La jare 1866 fondita municipo estis longe agrara loko kun 2000 loĝantoj kaj ekonomio plejparte bazita sur arbara industrio. Nun ĝi apud la kreskanta urbo Oulu forte kreskas, havas jam 18 000 loĝantojn kaj teknologian industrion.

La lokaj esperantistoj aktivis en informado al

amaskomunikiloj antaŭ la AT kaj rezulte aperis multaj bonkvalitaj artikoloj pri Esperanto en la gazetoj de la regiono. Ankaŭ la vespera orgenkonzerto de Esa Toivola ricevis rimarkindan kvanton da publiko el ekster esperantistaro.

Vizito al ŝtonepoka Kierikki ofertis bonan koniĝon pri la norda vivo antaŭ jarmiloj, per i.a. rekonstruita domo kaj aŭtentikaj spuroj de antikvaj domoj. Ekspozicio ilustris pri antikvaj iloj kaj etendiĝo de homaj loĝlokoj. Bedaŭrinde la tempo tie restis tre limigita, kio devigis onin rapide trairi la riĉan ekspozicion.

Markku Sarastamo prezentis sian antaŭ ne longe publikigitan libron "La grafino kaj ŝia fantasta vivo" kaj Leif Nordenstorm sian libron "Arne, la ĉefido" kaj ankaŭ ĵus en Esperanto ▷



*Pentraĵoj en la preĝejo de Haukipudas estas eksterordinaraj kaj tre unikaj.*

## Aŭtunaj Tagoj

publikigitan "Mio, mia filo" de Astrid Lindgren. Libroservo peris ankaŭ multajn aliajn librojn. Inter la novaĵoj EAF havas dikan gramatikan verkon "Plena manlibro de Esperanta gramatiko".

En fino de la tagoj ni ricevis interesajn sciigojn pri vivo de petromizoj, marbestoj, kiuj ĉiam aŭtune venas al riveroj por produkti idojn, kaj pri la fino de ilia vivo en kaptiloj. Rekorde varma aŭtuno ĉi-jare malfruigis la venon de la petromizoj tiel, ke nur kelkaj individuoj troviĝis en la kaptiloj. Ni tamen povis per propraj manoj palpi la strangajn bestojn, kiuj ne estas fiŝoj, kvankam vivas en akvo kiel fiŝoj, kaj ankaŭ ne serpentoj, kvankam aspektas kiel tiaj.

*Mikko Mäkitalo*



*Kaptisto de petromizoj sur sia kaptilo.*



*Olli Pajula kun gitaro gvidis kantadon.*



*Ŝtonepoka domo en Kierikki.*

## El blindullernejo ĝis doktoro

Steletano, delegito de LIBE, fil. mag. Aatu Moilanen (1934) rekomencis studi post pensiigo de sia laboro kiel estro de produktado de lernomaterialoj de la porblindula biblioteko Celia. Aatu gajnis alian magistrigon en sociologio kaj partoprenis bezonatajn studojn, fariĝis licenciulo, lasis disertaĵon al la universitato. La doktora disertacio okazis en la universitato de Joensuu 14.8.2006.

Oni povas konsideri, ke la studado ĝis doktoriĝo estas rezulto de intensiva familia entrepreno; edzino Gunvor estis la okuloj de Aatu en diverslokaj arkivoj kaj fontoj. Aatu perdis sian vidpovon kiel 10-jara scivolema knabo ludante kun samaj materialoj kiujn plenkreskuloj uzis en la milito. Post la malsanulejo Aatu daŭrigis lernadon en la blindullernejo de Kuopio.

La titolo de la disertacio estas: Ni prenu sur sin respondecon pri niaj propraj aferoj – Blindullernejoj flanke de popollernejoj en Finnlando 1865-1939. La disertacio pritraktas evoluon kaj edukajn celojn de blindullernejoj. Dum cent jaroj la edukado de blinduloj celis al tio, ke blinduloj prenu sur sin respondecon pri sia vivo.

duloj prenu sur sin respondecon pri sia vivo.

Nuntempe viddifektitoj studas integriĝe kun aliaj lernantoj kaj studantoj. Kvankam la evoluo plejparte estas pozitiva, Aatu Moilanen vidas problemojn almenaŭ koncerne fizikan edukadon.

– Ege bedaŭrinde estas, ke kelkaj viddifektitaj infanoj estas eĉ liberigitaj de gimnastiko kaj sporto. Ekposedo de korpo estas gravege por scipovi moviĝi sola. Por la propra memstareco estas grave, ke oni povas moviĝi sendepende, diras nia nova doktoro kaj amiko Aatu Moilanen.

Ni gratulas Aatu kaj Gunvor pro longdaŭra, sukcesa laboro.

*Ritva Sabelli.*

*Aatu Moilanen: Otetaan vastuu omista asioista – Sokeainkoulut kansakoululaitoksen rinnalla 1865-1939.*

Eventualaj omaĝoj al la fonduso Suomen Näkövammaissäätiö, Aktia 405540-230175.



*Aatu Moilanen  
inter profesoroj  
Päivi Atjonen kaj  
Arja Virta.*

## Albin Sandström, modesta pioniro de la finna esperantomovado

Albin Sandström estis unu el la pioniroj kiuj en 1907 fondis EAF:n. Post studenta ekzameno en Nystad (Uusikaupunki) 1899 kaj dujara merkata instituto en Helsingfors li eklaboris ĉe Schildt & Hallberg en Dickursby (Tikkurila). Dum lia 50-jara agado en la firmao la farboj el Tikkurila famiĝis pri sia alta kvalito. Albin edziĝis en 1911 kaj havis kvin gefilojn.

Komence de 1907 ni trovas Albin Sandström kiel kunfondanto de la kooperativo Ilarejo Esperantista, kies tasko estis vendado de presaĵoj kaj aliaj varoj kiuj povus akceli la disvastigon de la internacia helplingvo esperanto en Finnlando. Sandström estis la plej granda posedanto kaj ĝia unua direktoro. Tial li ankaŭ repondecis pri la gazeto Finna Esperantisto, kiun eldonis Ilarejo. La kvin unuaj numeroj aperis mimeografitaj, poste presitaj. Finna Esperantisto aperis redaktita de J. A. Wecksell en 1907–1910. Poste ĝi paŭzis pro ekonomiaj problemoj.

En aprilo 1907 Sandström funkciis kiel sekretario de la fondanta kunveno de EAF, kie oni ankaŭ decidis ke Finna Esperantisto estu ĝia organo. Sandström estis membro de la estraro de la komenco ĝis la jarkunveno 1925, la ses lastajn jarojn kiel prezidanto. Li redaktis la gazeton de 1912 ĝis la komenco de la milito 1914, kiam eldonisto estis EAF. La gazeto estis trilingva (eo, fi, sv). Dum tiuj jaroj li interalie defendis esperanton post prelego pri ido kaj prelegis al blinduloj pri uzado de esperanto inter alilandaj blinduloj. Li estis ankaŭ peranto de la membrokotizoj de UEA.

Post la milito oni en 1919 elektis G. J. Ramstedt prezidanto de EAF. Li tamen tuj poste estis sendita kiel ambasadoro al Japanio kaj de tiam prezidis Albin Sandström ĝis la jarkunveno 1925. La saman jaron finiĝis la firmao Movado, kiu kun samaj celoj kiel la iama Ilarejo eklaboris 1920 gvidata de Sandström.



*Albin Sandström (1883-1952).*

Plej konata Albin Sandström estas kiel prezidanto de LKK por UK en Helsinki-Helsingfors 1922. La celo de la laboro estis montri al la ekstera mondo ke Finnlando estas taŭga loko por internaciaj kongresoj. Oni ricevis subvenciojn de la ŝtato kaj de la urbo. Dum la solena fermo en la Nobelara domo oni menciis la LKK-prezidanton kiel “modesta kaj trankvila”. Bedaŭrinde lia trankvileco ne eltenis la lastajn akuzojn de la socialdemokrata ĵurnalo kontraŭ la svedlingvanoj kaj la burĝaro. Li akre montris sian malcontenton pri la enhavo kaj dum laborista kunveno la lastan vesperon li estis severe riproĉita kaj pripensis forlasi la movadon. Li tamen restis prezidanto de EAF post decido de laboristoj fondi propran asocion. Post la okazaĵo oni ankaŭ fondis por svedlingvanoj la societon Nordlumo, kie Albin Sandström estis unu el la unuaj estraranoj.

Lia plej juna filino (nask. en marto 1922) ne havas proprajn memorojn pri la esperantoaktivo de Albin, sed rakontas ke ŝiaj gepatroj en 1926 partoprenis al sveda kongreso en Stokholmo. Tamen filo de alia filino de Albin memoras ke lia avo ankoraŭ dum la 1940-jaroj ofte vespere legis en siaj esperantolibroj.

*Carola Antskog*



## Kontribuo al la historiografio de Esperanto

*Ordeno de verda plumo.*

*Leksikono pri esperantlingvaj verkistoj.*

*Josip Pleadin. Grafokom, Djurdjevac 2006. 272 p., 24 cm.*

Sojle de la 120-jariĝo de la Esperantlingva literaturo aperis digna kolekto de ĉirkaŭ 500 fotoj kaj 1000 biografioj de nunaj kaj malnovaj verkistoj, ne kompleta sed utila kaj interesa. Instigite de la aŭtorino Spomenka Štimec el la Esperantlingva Verkista Asocio kroata profesia esperantisto J. Pleadin dum pli ol du jaroj kompiladis leksikonon pri Esperantaj verkantoj, -intoj kaj -istoj. Malgraŭ la malkuraĝigo de kelkaj indiferecentuloj li elserĉis la materialon el ampleksa fontaro helpe de kunlaborantoj en trideko da landoj. Ankaŭ pseŭdonimojn li inkluzivis en la leksikonon, kun indiko al la vera nomo, se eblis. Li ne deziris taksi la verkojn sed prezenti la “verdan herbotapiŝon” en literatura parko, kie troviĝas ne nur kolosaj kverkoj (=niaj plej eminentaj verkistoj) sed la konsola multego de malpli konataj kreemuloj, kies verkoj aperis en gazetoj kaj bultenoj aŭ longe kuŝis en tirkestoj kaj kiuj ofte laboris, suferis kaj revis dum krizaj tempoj, en koncentrejoj, izoliteco, povreco. Ĉies vivo estas aparta brila gemo.

La amplekso de la biografioj ne kongruas kun la literatura graveco de la persono. La kompilinto scias, ke kelkaj legantoj trovos mankojn, sed, pensante pri aperonta nova eldono, li petas la legantojn sciigi lin pri la aldonendaĵoj. Tamen li jam nun rajtas fieri, ke multaj diversloke disemita biografioj kaj fotoj nun troviĝas en unu libro, pretaj helpi al tiuj, kiuj ilin bezonas. La hungara Enciklopedio de Esperanto ja datiĝas de la komenco de la 20 jarcento (1933).

Foliumante la nunan leksikonon oni povas ĝoji pri la bona papero, ne tro malgranda teksto, klareco kaj flua lingvo. (Ankaŭ mistajpaĵoj troveblas sed malmultaj.) El la fotoj nin rigardas nekonataj kaj konataj vizaĝoj, junaj kaj mal-

junaj, seriozaj, gajaj, kelkaj stampitaj per malfacila sorto. Sur la kovrilo enpensiĝinta ne juna viro kun plumo en la mano antaŭ blanka folio. La fotoj montras ankaŭ, ke Esperantlingvaj aŭtorinoj ne oftas. Tradukantojn kaj nebeletrajn verkistojn la leksikono ekskluzivis. En la fino troveblas historio de la kompilado kun dankoj al la kunlaborantoj, listo de la uzitaj mallongigoj kaj impona listo de la konsultita literaturo. La laboro certe postulis grandan tempoinveston kaj sindediĉon. En la komenco legindas la antaŭparolo, kie la kompilinto komparas sian verkon kun parko. Ne ĉiuj floroj troveblas en unu parko, tamen ni povas vere ĝoji pri tiu ĉi bela kaj ĝisnuna kolekto.

El niaj finnaj verkemuloj estas prezentataj ekzemple Reino Eriksson, Anja Karkiainen, Raimo Pystynen, Erkki Rasku, Saliko, Eija Salovaara. Finlandajn radikojn havas ankaŭ Aira Kankkunen (Svedio) kaj Sabira Shun (Ĉinio; n. Ståhlberg). Serĉu, ĉu vi trovos pliajn! En la esperata nova eldonaĵo estus interese vidi ankaŭ laŭlandan liston, nun la verkistoj aperas en pure alfabeto ordo.

*Raita Pyhälä*

## Ni sciigu pri jpanaĵoj

*HORI Jasuo, Raportoj el Japanio 9 – Libroteko Tokio, 2006 – 184 p*

Antaŭ la 92a UK en 2007 estas oportune konatiĝi kun la kongreslando Japanio pere de la raportaro de s-ro HORI. En sia naŭa libro li pritraktas precipe konfliktojn inter naciismo, milito kaj paco. Laŭ li ni ne plu estu pacamantoj sed pacagantoj. Li disponigas al la leganto sian poemon pri la naŭa artikolo de la japana konstitucio, kiu depost la dua mondmilito malpermesas al Japanio militi sed kiun nun kelkaj politikistoj kaj civitanoj deziras ŝanĝi. Aliaj temoj en la libro estas falsa mono, nomkartoj, umbilikaj ŝnuroj kaj interŝanĝiĝo de beboj, reuzado de nenecesaj pianoj, studado, dungigo, senlaboreco, emerita ▷



*En printempa (26.5.) ekskurso en la nacia parko de Repovesi. Partoprenis 20 esperantistoj kun siaj amikoj el Jyväskylä, Mikkeli, Lahti, Kotka kaj Helsinki-regiono. La ekskurson aranĝis Esperantoklubo de Jyväskylä kaj ĝin gvidis Synnöve Mynttinen el Kotka. La tago estis somere varma kaj la tereno tre ŝanĝema kaj postulema, la pejzaĝoj belegaj. (Seija Kettunen)*

▷ vivo, demenco. Krome, li prezentas sin mem kaj sian longan karieron kiel lingvoinstruisto kaj esperantisto.

Fine de la libro troveblas listo de la esperantaj kaj alilingvaj verkaĵoj de la aŭtoro. Troveblas ankaŭ mapetoj, desegnaĵoj, fotoj, statistikaĵoj, historieto de Japanio. La lingvo estas sufiĉe facila kaj flua. Entute la libro estas sincera mesaĝo al aziaj kaj tutmondaj esperantistoj, kiuj kore deziras pacon.

Se vin vere interesas japana socio kaj vivo, havigu al vi ankaŭ iu(j)n el la antaŭaj Raportoj 1-8, kiuj prikomentas la jarojn 1991-2005 kaj aldone klarigas plurajn japanajn kutimojn, tradiciojn kaj fenomenojn. La prezo estas po iom pli ol 12 eŭroj.

*Saliko*

### VT en Kotka

Vintraĵ tagoj kaj Jarkunveno 10.-11.03.07 en Kotka Sokos-hotelli Seurahuone.

Suomen Esperantoliiton Talvipäivät ja vuosikokous 10.-11.03.2007 Sokos-hotelli Seurahuone Kotka.

### Balta Esperanto-Forumo

Balta Esperanto-Forumo estas somera renkontiĝo de esperantistoj el la landoj ĉirkaŭ la Balta Maro. Ĝin iniciatis “La Ondo de Esperanto” kiel kultur-klerigan forumon. BEF okazos 21-26 jul 2007 en Kaliningrado (Ruslando). Abonantoj de “La Ondo de Esperanto” ricevis informilon kun la oktobra revuo, rete ĝi legeblas en:

<http://www.esperanto.org/Ondo/Bef/Bef4.htm>

## La plej granda Esperanto-verkisto mortis

William Auld, la plej elstara Esperanto-verkisto, forpasis la 11-an de septembro. Li naskiĝis la 6-an de novembro 1924, eklernis Esperanton en 1937. En la Jubilea Jaro 1987 William Auld estis elektita Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio. Profesie li estis vicestro de liceo en la skota urbeto Dolaro.

Auld estis unu el la plej konataj kaj fekundaj kontribuantoj al la Esperanta kulturo, kiu aŭtoris, tradukis aŭ redaktis plurajn dekojn da libroj. Li estas unu el la plej ofte premiitaj partoprenintoj de la Belartaj Konkursoj de UEA.

Lia ĉefverko estas la poeziaĵo “La infana raso” (1956), kiu pro sia humanisma kaj porpaca mondrigardo fariĝis kvazaŭ “nacia epopeo” esperantista. Liaj kolektitaj poemoj aperis en la volumo “En barko senpilota” (1987).

Auld verkis amason da eseoj, artikoloj kaj prelegoj por multaj gazetoj kaj Esperanto-aranĝoj. Ili aperis ankaŭ libroforme en “Facetoj de Esperanto” (1976), “Pri lingvo kaj aliaj artoj” (1978), “Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto” (1979), “Vereco, distro, stilo: Romanoj en Esperanto” (1981), “Kulturo kaj internacia lingvo” (1986) kaj “Pajleroj kaj stoploj” (1986). En 1988 aperis lia enkonduko al la Esperantaj lingvoj kaj movado “La fenomeno Esperanto”. Abunda estas ankaŭ la rikolto de tradukoj fare de Auld.

Auld redaktis plurajn revuojn, i.a. “Esperanto” 1955-1958 kaj 1961-1962 kaj kunlaboris kun aliaj gazetoj. Li verkis sennombrajn recenzojn kaj kelkajn lernolibrojn. En 1995 Auld ricevis la Premion Deguchi, en 1998 li fariĝis la unua Esperantisto de la Jaro en la voĉdonado de “La Ondo de Esperanto”, kaj en 2000 li gajnis la FAME-kulturpremion. Li estis ankaŭ honora prezidanto de Esperanta PEN-Centro. En 1999 William Auld estis unuafoje kandidatigita por la literatura Nobel-premio.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

## Kaksikielinen satukirja – Dulingva fabellibro

Markku Sarastamon kaksikielinen satukirja *Kreivitär ja hänen huikea elämänsä* on ilmestynyt. Samoissa kansissa sekä esperantoksi että suomeksi satua on n. 60 sivua ja lisäksi yli 20 värikästä akvarellia. Kirjaa saa EAF:lta, hinta 24 euroa (yhteyshenkilö Päivi Saarinen, [eaftmendoj@esperanto.fi](mailto:eaftmendoj@esperanto.fi)).

Aperis dulingva fabellibro *La Grafino kaj ŝia fantasta vivo* de Markku Sarastamo. Inter la kovriiloj legeblas sesdeko da paĝoj en Esperanto kaj la sama en la finna. Krome troveblas pli ol 20 koloraj akvareloj. Mendebblas de EAF, pr. 24 e (libroserva respondeculo Päivi Saarinen, [eaftmendoj@esperanto.fi](mailto:eaftmendoj@esperanto.fi)).

## EU-prezidaj novaĵoj en Esperanto

Finnlando estas la prezida lando de Eŭropa Unio laŭ sia vico nun la duan duonon de tiu ĉi jaro. Aperas novaĵletero pri la prezidaj aferoj ĉiun semajnon nun ankaŭ en Esperanto. La novaĵletero aperas anglalingve ĉiun lundon kaj en latino ĉiun merkredon, ili estas legeblaj interrete en [http://eu2006.fi/news\\_and\\_documents/newsletters/en\\_GB/newsletters/](http://eu2006.fi/news_and_documents/newsletters/en_GB/newsletters/)

kaj la traduko en Esperanto aperas kutime merkrede en <http://conspectus.wordpress.com/>  
(mm)

## Korespondado al Japanio

Se vi volas havi leter-amikojn en Japanio, skribu al Japana Esperanto-Korespondo-Servo, KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka, JP-561-0802, Japanio. Skribu ne per reto, sed nepre per afrankita letero aŭ poŝtkarto, kaj preslitere viajn nomon, adreson, aĝon, sekson, okupon, interesojn, ktp. Nia servo nepre sendos konfirman karton al via letero.

*Kun amikaj dankoj kaj salutoj, Mine Yositaka  
por Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj*

## Helsinki festis 100 jarojn

La 10-an de oktobro la Esperanto-klubo festis trioble. Unue, ĝi festis la 100-jariĝon de la societo La Polusstelo, due temis pri la 70-jara festo de la nuna societo, kiu estis fondita en 1936 sub la nomo Laborista Esperanto-klubo de Helsinki kaj, trie, temis pri la 40-jara festo de la societo sub ĝia nuna nomo Esperanto-Klubo de Helsinki. Al la vespera festo en restoracio Vltava en la urbocentro de Helsinki partoprenis 25 klubanoj kaj honoraj gastoj.

Profesoro Jouko Lindstedt prelegis pri la temo “Esperantismo – ĉu la sama kiel antaŭ 100-jaroj”. Li trarigardis la fruajn dokumentojn pri esperantismo kiel Bulonja deklaro kaj Zamenhofa “Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia”. En la Bulonja deklaro la celoj de Esperanto estis disvastigo de neŭtrale homa lingvo, paciga rolo de tiu lingvo en landoj, kie

diversaj popoloj batalas inter si pro la lingvo kaj eldonado de verkoj, kiuj havas egalan valoron al ĉiuj popoloj. Tiutempe esperantistoj kredis, ke Esperanto venkos preskaŭ aŭtomate, ke la lingvo internacia povas esti nur neŭtrala lingvo.

Poste okazis gravaj ŝanĝoj en internacia vivo. Unu el gravaj eksteraj evoluoj estis apero de internaciaj organizoj, kiuj havis similajn celojn kiel esperantistoj kaj kiuj bazigis sian agadon al paco, egaleco ktp. Aperis koncepto de homaj rajtoj, kiun esperantistoj sentis proksima al siaj celoj kaj homaj rajtoj estis akceptitaj kiel bazo de agado de UEA. Alia evoluo estis, ke la angla fariĝis tiu internacia lingvo per kiu eblas komuniki per simila maniero, kiel fruaj esperantistoj pensis por Esperanto. Granda parto de la ideologia diskuto en nuna Esperanto-movado temas



*Jukka Pietiläinen ricevas donacojn, ankaŭ je la amuzo de ĉiuj, maldekstre Jouko Lindstedt, dekstre Tuula Virolainen kaj Päivi Saarinen.*

pri la defio, kiun la angla lingvo prezentas.

Al la nuna internacia rolo de la angla esperantistoj respondas diversmaniere. Unu respondo estas nei la faktojn. Temas pri tio, ke esperantistoj dubas la internacie gravan rolon de la angla kaj diras ke ĝi ne estas tiom vaste uzata kaj ke homoj lernas ĝin sufiĉe malbone. Tamen neniam antaŭe ekzistis tia monda lingvo kiel la angla nuntempe kaj multaj lernas la anglan tiom bone, kiom ili bezonas por siaj celoj.

Dua respondo estas turniĝi al si mem, forgesi movadon kaj eksterajn celojn kaj okupiĝi nur pri la interna vivo de Esperanto-komunumo. Parto de la ekstermaj raŭmismoj ĉirkaŭ Esperanta Civito subtenas tian agadlinion. Tria respondo estas heroa provo konkurenci kun la angla, ekzemple eldonante fakan literaturon en Esperanto kaj kreante diversajn servojn.

Kvara respondo estas serĉi la propran lokon de Esperanto en la procezo de tutmondiĝo. Laŭ Lindstedt kulturaj festivaloj estas tre gravaj aranĝoj, kiuj manifestos nian propran manieron fari internacian kulturon. Ne plu mankas internacia lingvo en la teknika senco, sed mankas justa kaj facila internacia lingvo, kies parolantoj identigas sin kun la tuta homaro.

Jukka Pietiläinen resumis la historion de la klubo (vidu apartan artikolon). Ankaŭ la festa skatolo de EAF, kiu ĉirkaŭiras en Finnlando kaj invitas al la 100-jara festo de EAF en aprilo 2007, komencis sian vojaĝon en la festo.

En sia salutmesaĝo la prezidanto de UEA Renato Corsetti, legita de ĉefdelegito Päivi Saarinen diris, ke “la evoluo de la movado estus tre pli malfacila sen la lokaj Esperanto-klubo, kiuj estis la vera praktika teritorio de Esperantujo en periodo, kiam komunikado kaj vojaĝado estis tre pli malfacila ol nun.” Li ankaŭ emfazis, ke necesas ankaŭ estontece agi tiel, ke la novaj esperantistoj, kiuj nuntempe lernas per la reto, fariĝu parto de Esperantujo. En tio la rolo de lokaj kluboj estas tre grava. Sian saluton sendis ankaŭ FEJO kaj kelkaj lokaj Esperanto-klubo.

*Jukka Pietiläinen*

## Esperanto-agado en Helsinko 100-jara

Esperanto-klubo de Helsinko festis 100 jarojn de organizita esperanto-agado en Helsinko la 10-an de oktobro 2006. Fakte temis pri centjariĝo de societo La Polusstelo, kiu estis fondita en marto 1906. Jam en februaro 1905 fondiĝis “Klubo Esperantista de Finnaj Studentoj”, kiu organizis kurson vintre 1906 kaj anoncis pri tio en gazetaro. La anoj pensis, “ke trideko da lernantoj estus bona rezultato. Sed alvenis kune 208 kursanoj! Kiam la kursdonantoj kun ardantaj vangoj skribis la longan nomaron, tiam ili ekvidis, ke la tempo estas matura por fondo de ĝenerala societo. La 3-an de februaro komencis la kursoj, dividite en du sekcioj, la 18-an de februaro la direkto de la studenta klubo kunvokis unuan ĝeneralan kunvenon por fondo de societo. Preskaŭ cent personoj kunvenis en universitata aŭditorio kaj unuanime oni decidis fondi ĝeneralan societon esperantistan en Helsinko. Oni elektis kvinpersonan komitaton por prilabori regularon; en la kunveno post du semajnoj ties propono estis diskutata kaj en la fonda kunveno la 18-an de marto fine aprobita. Tuj enkribiĝis 38 anoj.”

Tiel skribis en la unua jarraporto de la societo la sekretario A. A. Sola, junulo, kiu tre multe aktivis por Esperanto. La nova societo havis nomon “La Polusstelo”, per kiu ĝi estis ankaŭ registrita. Dum la unua agadjaro la societo havis 17 kunvenojn, kiujn ordinaro partoprenis 12-20 personoj. Fine de la jaro la societo havis 68 membrojn. La unua prezidanto estis Hjalmar Runeberg. Vicprezidanto estis studento A. Harlin, sekretario estis studento A. A. Sola, kasisto estis librejisto W. S. Mäkelä.

Dum la jaro 1906 la kunvenejo estis en la universitato, kaj dum 1907 en restoracio Reform ĉe Norda Esplanada strato 39. La societo komencis plani finnan-esperantan vortaron, propran gazeton kaj decidis aranĝi en la fino de aprilo 1907 esperantistan feston kaj ĝeneralan ▷

kunvenon de Finnlandaj esperantistoj. Tiam la kunvenon partoprenis 30 esperantistoj, el kiuj duono estis de ekster Helsinko. Tiam fondiĝis Esperanto-Asocio de Finnlando.

La Polusstelo estis la ĉefa esperanta societo en Helsinko dum la sekvontaj 15 jaroj. En 1921 estis fondita laborista esperantoklubo Unueco, en 1923 svedlingva esperanto-societo Nordlumo, sed ĝenerale post la universala kongreso en Helsinko en 1922 la esperanta agado restis malaktiva, aŭ mankas klaraj informoj pri ĝi. Tamen kursoj estis organizitaj kaj Vilho Setälä kaj lia Esperanto-Instituto funkciis kiel neŭtrala kuniganto de esperantistoj.

En 1936 estis fondita la rekta antaŭulo de la nuna Esperanto-klubo de Helsinko. Tiam ĝi nomiĝis Laborista Esperanto-klubo. La unua prezidanto estis Johan Henrik Lindholm. En 1937 la societo aranĝis en laborista halo de Helsinko 50-jaran feston de Esperanto, kie festparolantoj estis Vilho Setälä kaj Kaisu-Mirjami Rydberg. La programo estis plejparte en Esperanto. La klubo eldonis ankaŭ propran manskribitan gazeton, kiu nomiĝis Rondo.

En 1966 la esperanto-movado estis unuiĝinta. Laborista esperanto-asocio ne plu funkciis. Krome en Helsinko aperis ideo revivigi neŭtralan societon La Polusstelo. Tamen la aktivuloj de la laborista societo estis pli rapidaj kaj en majo 1966 la eksterordinara kunveno de Laborista Esperanto-Societo en Helsinko-a laborista halo decidis ŝanĝi la nomon de la societo al Esperanto-klubo de Helsinko (Helsingin Esperanto-seura). La kunvenon partoprenis 13 membroj. Tiam la prezidanto de la societo estis Olli Varsamäki, kaj la sekretario estis Rauni Kannikoski. Vicprezidanto estis Jorma Samposalo kaj kasisto Akseli Kirsilä. Al estraro apartenis ankaŭ Johan Eerola kaj vicmembroj estis Kaarlo Jokinen kaj Paavo Huttunen.

Per tiu nomo la societo funkcias ekde tiam. Nuntempe ĝi havas proksimume 70 membrojn, do preskaŭ same multe kiel antaŭ cent jaroj.

*Jukka Pietiläinen*

## Estraro kunvenis

La estraro kunvenis kadre de la AKK-projekto 26.8.2006 je 11.10-15.30 en la oficejo (estrara kunsido 7/2006), ĉeestis Ritamäki, Oittinen, Eriksson, Huuskonen, Saarinen, Saastamoinen, Grundström, Pirinen.

La estraro dankeme konstatis ke dum foresto de librotenisto Paula Niinikorpi la asocia kasisto Tiina Kosunen pretas fari ankaŭ la librotenadon por 2006. Paula vizitis tiucele ĉe Tiina K. 20.8.2006. La retadreso *esperanto.fi* estis reabonita de Suomen viestintävirasto (Finnlanda komunikada oficejo), kostoj 50 e.

La estraro konfirmis la retpoŝtan decidon de julio pri aĉeto de DVD:oj Esperanto Elektronike de E@I, vendoprezoj 9 e, 6 e por membroasocioj, rabato ankaŭ por aĉeto dum UK.

Al la biblioteko estis aĉetita DVD Vizito al Centra Oficejo de UEA.

La fabellibro de Markku Sarastamo *La grafino kaj ŝia fantasta vivo – Kreivitär ja hänen huikea elämänsä* aperis nun dulingve, traduko de Raita Pyhälä. EAF aĉetis 18 ekzemplerojn kaj ricevis 3 senpage. EAF pretas helpi sendi la librojn al UEA por vendado kaj por belartaj konkursoj (infanlibro de la jaro).

La asocia organo EF denove ricevis 1000 eŭrojn de la edukministerio. La abonkotizojn la estraro fiksas senŝanĝaj: ordinaraj abonoj 18,00 e, membroj pere de membroasocioj 12 e, membroasocioj abonantaj al ĉiuj siaj membroj kaj por ordinaraj FEJO-membroj tra FEJO 10 e.

La estraro konstatis la realigojn de la someraj aranĝoj kaj la datojn de la sekvajara kurso en Valamo: 23.-27.7.2007 lige al Arta Lumo -festivalo, ĉefinstruisto denove Atilio Orellana Rojas, kursogvidanto Tiina O, laŭbezono dua tuttempa instruisto el Finnlando.

Pri la orgena koncerto de Esa Toivola dum AT en Haukipudas kunlaboras Kiiminkijoen opisto kaj la paroko de Haukipudas pagante grandan parton de la kostoj.

La estraro decidis aranĝi la ĉefan jubilean

feston en Nobelara domo (Riddarhuset – Ritarihuone). La antaŭan tagon la AR, PS, TH kaj historioprojekta kunordiganto Carola Antskog vizitis la domon kaj la festosalonon de restoracio Kaarle XII. La Nobelara domo montriĝis klare plej taŭga (tre solena, pli granda kaj tial pli facile organizeblas kaj taga festo kaj vespera bankedo).

La jubilea tago en Helsinko 28.4.2007 enhavos diversajn programojn. Ĉirkaŭ la urbo okazos publika kvizpromeno, kies partoprenantoj trovos en lokoj gravaj por Esperanto en Helsinko personojn, kiuj prezentos la respondojn. La rakontantoj povos esti vestitaj ekzemple laŭ la stilo de 1907. Sur la loko kie okazis la fonda kunveno estas nun librovendejo Akateeminen kirjakauppa – Akademiska bokhandeln. La ĉefparolanto Renato Corsetti pretas veni jam kelkajn tagojn antaŭe kaj laŭ bezono partopreni en aliaj aranĝoj ekzemple en la universitato.

EsperHe planas malfermi esperantoekspozicion en la universitato komence de 2007. En Raŭmo estos esperantoprogramo dum Rauman kiel- ja murrepäivät en februaro.

Prepare al la festivalo Arta Lumo en Kuopio 27.7.-1.8.2007 AR, PS kaj TO vizitis laŭplane en Kuopio 22-23.6.2006 kaj konatiĝis kun Muzikcentro de Kuopio. Ili estis en kontakto ankaŭ kun Kuopion Matkailupalvelu (turista servo), kiu povos multe helpi kun la praktikaĵoj. La prezidanto kontaktiĝis kun diversaj artistoj kaj dum la UK kaj alie. Tiuj kiuj aperis en la reklama multoblikaĵo jam provizore promesis veni.

Lige al la festivalo estos aranĝita antaŭekskurso al Valamo 26.-27.7.2007. Post konatiĝo kun la monaĥejo la partoprenantoj vojaĝos surŝipe el Heinävesi al Kuopio.

EAF reklamis dum la UK en Florenco, i.a. en la Movada foiro, pri siaj venontaj aranĝoj, speciale la festivalon. En la kongresa libro aperis Arta Lumo-anonco. La prezidanto salutis la kongreson kun LED-lumoj. Estis kontaktoj kun firmao Oversol, produktanto de lumidiodoj, pri

subteno al la festivalo Arta Lumo per produktoj.

La estraro diskutis preparojn por la monkollektita permespeto, petoj al Suomen kulttuurirahasto – Terttu Östermanin rahasto [poste montriĝis ke la fondaĵo tamen ne estas en disdona vico, sed indas fari petojn] kaj aliaj subvencidonaj instancoj.

La estraro notis: Dum la UK la A-komitatoj de Finnlando, Danlando kaj Norvegio havis kunvenon por pritrakti la nordian kunlaboron. 100-jara jubileo de Esperanto-klubo de Helsinko (EKH) en oktobro 2006. EU-novaĵoj ĉiusemajne ankaŭ esperante dum la estroperiodo de Finnlando iniciate de Tim Morley el Britio. Kalle Kniivilä kunlaboris kun li kaj petis permeson por publikigi la esperantlingvan version. [EAF dissendis gazetaran komunikon 4.9, ne venis informoj pri publikigoj]. Tuomo Grundström estas invitita prelegi dum Lingvo-festivalo en Västerås 14.10.2006. Li estas invitita de loka klubo kaj la urbo Västerås.

Sekva kunsido: 28.10.2006 en la oficejo en Helsinko.

## Eventokalendaro de EAF

### Jubilea jaro 2007

10–11.3.2007 Vintraj Tagoj de EAF, Kotka

28.4.2007 Jubilea tago, Helsinko: urba

programo, jubilea festo, jubilea bankedo

23–27.7.2007 Esperantokursoj en Valamo

(Valamon kansanopisto)

26–27.7.2007 Antaŭekskurso de monaĥejo ĝis Kuopio

27.7–1.8.2007 Festivalo Arta Lumo, Kuopio

27.7–3.8.2007 Internacia Junulara Kongreso, Hanojo, Vjetnamio (TEJO)

4–11.8.2007 Universala Kongreso, Jokohamo, Japanio (UEA)

aŭtuno 2007 Lingvopolitika jubilea evento

# Bonvenon al jubilea tago de Esperanto-Asocio de Finnlando!

Esperanto-Asocio de Finnlando invitas al jubilea tago 28.4.2007 en Helsinko. Ĉi tie ni prezentas provizorajn informojn. Sekvu la evoluon de la festaj aranĝoj en Esperanta Finnlando!

## Antaŭtagmeze

---

Programo en la urbo

- interalie kvizopromeno malferma al la ĝenerala publiko

## Posttagmeze

---

Jubilea festo en la Nobelara domo

- Festparolado Renato Corsetti, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

- Arta programo
- Historia prezento
- Konatiĝo kun la domo kaj multo plia
- Kafoservado dum paŭzo, la taga festo daŭros ĉ. 3 horojn.

Kotizo: modera

## Vespere

---

Jubilea bankedo

- Bonaj manĝaĵoj en solena etoso honore al Esperanto-Asocio de Finnlando

Rekomendata pago por la bankedo: 100 eŭroj.

*La estraro de EAF*



*Monica Saxén montras la nobelaran domon al EAF-estraranoj Päivi Saarinen, Taneli Huuskonen kaj Anna Ritamäki.*



## Salotago videbligis lokan klubon

Esperantoklubo de Salo partoprenis videble en la tradicia Salotago sabate la 2an de septembro 2006. En la biblioteko estis Esperantoekspozicio je 9.30-15, la plej frue komenciĝinta evento de la multprogramera tago. Tial multegaj vidis la informon pri la ekspozicio, kvankam Eero Saari, prezidanto, kaj Anna Ritamäki, membro kaj EAF-prezidanto, havis okazon prezenti sian agadon nur por malmultaj vizitantoj.

La biblioteko kontribuis per ekzpozicio de siaj Esperantolibroj, kiuj bedaŭrinde estas malnovaj. Ni interkonsentis sendi proponliston al la biblioteko pri libroj akirindaj.

Kelkajn junajn bibliotekvizitantojn allogis la Esperantoelekto-ludo kompilita de Skolta Esperanto-Ligo. Ĝusta kombino de ekzemple teksteto "Silja amas Karlon" kun la ĝusta bildo aŭ "oraj ringoj" kun du ringoj lumigis lampetojn. Amo estis la temo de la ĉi-jara Salotago.

### Kursoj dum Zamenhoftaga semajnfino

Tri personoj, interalie virino kiu iam lernis Esperanton kiel lernejo en Somero, dum la Salotago enskribiĝis al la E-ku-listo (informoj pri Esperantokursoj). Sekva okazo lerni en la Salo-



*Kaisa Roto lernis Esperanton kiel lernejo en Somero.*



*Eero Saari forportas Esperantoelektron, fone la biblioteko kaj Esperantoŝildo.*

regiono estas 15-17 decembro en Källkullen, Kimito (Kemiö). Tiam okazos diversnivelaĵ kursoj. Partoprenos interalie grupo de Sanktpeterburgo. Kontaktpersono por la E-ku-listo kaj por la kurso: Carola Antskog, 02-42 3146, [E-ku-estro@esperanto.fi](mailto:E-ku-estro@esperanto.fi).  
(amr)

**KAIKKI TILAISUUDET  
ILMAISET PAIKKURIBUSSIT,**

**9.30 – 15.00**  
4. **Salon Esperanto -seura**  
Kirjastossa toimintaa esittelevä näyttely.

**10.00 – 14.00**  
3. **Uskelan kirkko ja kirkontorni**  
avoinna

*Plej supra loko en afiŝoj (bilde), broŝuroj kaj eĉ sur la unua paĝo de Salon Seudun Sanomat.*

## Jyväskylän syksyä

Jyväskylän Esperantokerho järjestää Sepänkeskuksen Happi-kokoustilassa keski- viikkoisin klo 16.30–19.00:

*La Esperanto-klubo de Jyväskylä organizas en Happi-kunvenejo de Sepänkeskus en merkredoj je 16.30–19.00:*

ke 15.11. Opintopiiri – Studrondo

Opiskelumateriaalina on Peter Härtlingin kirja AVINJO, jonka on kääntänyt esperantoksi Nora Caragea. Tekstin avulla kartutamme sanavarastoa, keskitymme mm. esperanton kielen sananmuodotukseen ja taulukkosanojen käyttöön sekä keskustelemme tekstin aihepiireihin liittyvistä ilmiöistä.

ke 29.11. Yhdistyksen syyskokous – Aütuna kunveno de la societo

ke 13.12. Opintopiiri jouluisen tarjoilun kera – Studrondo kun sezonaj frandaĵoj

*(el Tintileto redaktis mm)*

## Okazos en Turku

Ĉiumerkrede je 16.30–17.30 diskutrondo en Cafe Art.

Esperanto-societo en Turku havas la tradician julan feston en la tago de Lucia, **merkredon 13.12.2006 je 16.30–18.30** en Malnova urbo-domo, Blua salono. La programo enhavas kaj tradiciajn kaj surprizajn partojn. Helpu la koboldon per eta donaco. Kafumado kun malalta prezo. Bonvenon!

# duplustro



## Ĉu vere ekzistas Esperantaj gazetoj?

Iam kaj tiam oni telefonas kaj ofertas al mi iun revuon por abono. Mi ĉiam respondas ke mi legas nur Esperantajn tiajn. Poste ili miras "Ĉu vere ekzistas tiaj?" Kaj mi povas aserti /certigi ke "Jes, kompreneble."

Tiel mi ricevas bonan eblecon reklami Esperanton.

*Fartu bone kaj ĝojan aŭtunon al vi deziris Anja Launiainen*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti [ilkka.santtila@welho.com](mailto:ilkka.santtila@welho.com) mieluummin kirjallisena.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki) [jukka.p@esperanto.fi](mailto:jukka.p@esperanto.fi) (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi.
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 [kari.kettunen@pp1.inet.fi](mailto:kari.kettunen@pp1.inet.fi)
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. [martti.pennanen@phnet.fi](mailto:martti.pennanen@phnet.fi)
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry, (Olli Pajula) Ojalanperäntie 47, 90860 Halosenniemi. [olli.pajula@dnainternet.net](mailto:olli.pajula@dnainternet.net)
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Eero Saari) Kössinkatu 2 as 7, 24100 Salo. ☎ (02) 735 6130
- ♦ Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 [markku.saastamoinen@jippii.fi](mailto:markku.saastamoinen@jippii.fi))
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärsvägen 89, 25700 Kimito. [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi). Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: 563000-2213606
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2006 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Hämeenlinnalaisille esperantisteille voi lähettää postia osoitteella: [sarastamo@gmail.com](mailto:sarastamo@gmail.com) tai Esperantogrupeto Verda Ilo, c/o Markku Sarastamo, Jyrätie 6 a 15, 13500 Hämeenlinna.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla ja Taivalkoskella.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2006**  
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
6	10.11.	20.11.	10.12.

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: [eaflehti@esperanto.fi](mailto:eaflehti@esperanto.fi) aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



*La jubilea skatolo cirkulas Finnlandon invitante al la nobelara domo 28.4.2007.*

### **Seuraava numero ♦ Venonta numero**

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Jutut 20.11.2006 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 20.11.2006 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eaflehti@esperanto.fi>.